

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 26/11/2020 Kvincentesa eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)



Entute **759,900** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **288,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **221,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **214,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **36,900** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde februaro /marto 2021)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 11 DE “THE ESPERANTO-TEACHER” (de Mason Stuttard).



### N.ro 11 de “Por Komencantoj”.

La t.n. “Imperativo” indikas, per la finaĵo “-u”, ke la uzanto, la parolanto, deziras ke iu aŭ io, la Subjekto de la frazo kun la verbo kun “-u”, faras la agon indikitan en la frazo. La verbtempo ne estas indikata, sed povas esti nur la nuno aŭ la estonto. Tre malofte oni povas deziri ke io neokazinta tamen okazu en la pasinteco. La forto de la deziro ne estas indikata en la verbo, kaj povas okupi tutan gradaron de milda espero ĝis forta ordono. Ekstraj vortoj indikas tiun gradon, kiel “Mi deziretas; Mi



atendas; Mi ordonas, Via devo estas” k.t.p. Ofte la subjekto de la ordonota ago ne estas menciata, ĉar la deziranto aŭ ordonanto diras la ordonon rekte al la Subjekto de la farota ago, kaj do ĉiuj scias kiu devas fari ion. Jen ekzemploj: Mi deziras ke ci AĈETU por mi lakton; La instruisto ordonis, ke la tuta klaso RESTU postlerneje; Mi ŝatas, ke vi REVENU morgaŭ; Ne FORGESU vian pluvombreton!; DORMU bone, mia infano!; FORIRU tuj el mia vido!.

. (daŭrigota) **Marcel Leereveld.**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



## Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko

Protektilo por la surportanto sed ankaŭ por la proksimuloj

## La risiko de aerosola transdono.

# La homoj devas konsideri minimumigi tempon endome kun homoj ekster siaj familioj.

# Kreskantaj sciencaj pruvoj sugestas ke la koronaviruso povas resti supre en la aero en etaj gutetoj en stagna aero dum horoj, infektante homojn dum ili enspiras.

# La risiko estas plej alta en superplenaj internaj spacoj kun malbona ventolado.

# Eksteraj lokoj estas pli sendanĝera.

# Malaltigu la kovrilon de la necesejo unue kaj poste akvumu la pelvon

# Kaj daŭre portu tiujn maskojn.

Roger Springer



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendas vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj

La 21a de novembro estis la tria sabato. Venis Chris, John kaj Roger.

Roger Springer



## HAVE-A-GO-DAY ("PROVU-TAGO") Okcident-Aŭstralio-Esperanto-Ligo

ELOA partoprenis en "Have-a-Go-Day" je la 11-a de Novembro per stando ĉe Burswood sur la suda digo de la Rivero Cigno. "Provu-Tago" celas homojn pli ol 50-jaraĝajn. Troviĝis kelkcentoj da standoj, ekspozicioj de kvadrato-dancado kaj simile, kaj tiel plu.


Ron Cameron helpis al Trish O'Connor starigi la Esperanto-standojn, afiŝojn kaj la ceteron en la stando. John Massam ankaŭ partoprenis.

Pro la kronviruso, ELOA decidis ne proponi en la budo la kutimajn (en pasintaj jaroj) ekzamenetojn post simplaj lecionetoj sur flugfolioj.

Prezidanto Shayne Power kaj Trish bone interrilatis kun homoj kiuj montris intereson, kaj kelkaj prenis la unuan lecionon kaj/aŭ aliajn informaĵojn proponitajn

Estis Armistico-Tago, do, ĉirkaŭ la 11-atm, memore al la kuraĝaj ge-batalantoj de pasintaj militoj, klariono sonigis la melodiojn de "La Lasta Posteno" kaj Veksignalo".

John Massam.



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

**Rainer Kurz** sendis al mi retmeŝaĝon el germanujo pri la kontaktdetaloj de Volo Güeltling laŭ peto en AE504

Mi, Roger, telefonis Volon kaj li loĝas en *Wentworth Falls* tre proksime al Sidnejo kaj fartas bone



Volo Güeltling



## Aŭstralia kaj Nov-Zelanda virtuala kongreso kaj somerkursaro 2021



Pro la daŭraj limigoj pri vojaĝoj kaj kunvenoj rilate al KOVIM-19, la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio decidis, ke la kongreso de 2021 estu tute interreta evento.

### Kiam?

**De sabato, la 9-a de januaro ĝis merkredo, la 13-a de januaro 2021**

Ĉiu tago estos disigita en 4 sekciojn (laŭ Orienta Aŭstralia Somer-Tempo, UTC-11):

1: 11:00–13:00

2: 14:00–15:30

3: 16:00–18:00

4: 19:00–21:00

Intertempe, okazos manĝoj aŭ kafopaŭzoj kun neformala interreta babilado.

### Kio?

La programo inkluzivos: klasoj de Esperanto, prelegoj pri Esperanto kaj aliaj temoj, Jarkunvenoj, planado, babilado, ridado kaj amikiĝado.

### Kiuj?

Eminentaj esperantistoj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kaj ĉirkaŭ la mondo, instruos kaj prelegos, inkluzive de **Katalin Kováts**, unu el la plej famaj instruistoj de Esperanto.

### Kiel?

La preciza miksaĵo de teknologioj estas decidota, sed verŝajne inkluzivos Zoom aŭ Jitsi (kiel

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

uzita en Virtuala Kongreso de UEA) kaj/aŭ YouTube.

Unu interesa ideo estas, ke lokaj grupoj organizu ĉeestajn kunvenojn, kie ili povas kune partopreni, almenaŭ dum parto de la kongreso.

**Kiom?**

Por membroj de AEA aŭ NZEA la kongreso estos senpaga (tamen bonvole serioze konsideru kontribui per serioza mondonaco)

Por ne-membroj: Pagu tion, kion vi povas, aŭ membriĝu al AEA kaj partoprenu senpage.

**Por pli da informoj kaj por mendo**


Vizitu: [aea.esperanto.org.au/eo/pri-ni/kongreso](http://aea.esperanto.org.au/eo/pri-ni/kongreso)

*Jonathan Cooper*



Ni bezonas novan manieron pensi, se la homo povos postvivi.

**Albert Einstein**



**LA MEDIO**

La nuna ekonomia sistemo bezonas ke la plej multaj homoj aĉetas aĵojn kiuj estas dezirataj ne bezonataj. Ŝajnas ke profito pli gravas ol la medio.

Kion vi opinias?

*Roger Springer*



**Ne mordu la manon, kiu nutras vin**

Kiam ni voĉdonas por politikistoj, ni elektos tiujn, kiuj verŝajne plej helpas Aŭstralion kaj ĝian popolon.

Ni ne elektas ilin por kritiki aliajn fremdajn politikistojn, sendi soldatojn eksterlanden, por mortigi fremdulojn ktp.

SED nia Ĉefministro rajtas fari tion sen voĉdono en la parlamento.

Bedaŭrinde niaj politikistoj ofte kredas, ke ni voĉdonas por ili kiel mondpolitikistoj

**Gough Whitlam** revenigis niajn soldatojn el Vietnamio kaj kritikis la *Pine Gap* Usonan militbazon en la mezo de Aŭstralio kaj pagis la prezon.

<https://www.theguardian.com/commentisfree/2014/oct/23/gough-whitlam-1975-coup-ended-australian-independence>



Neniuj sekvantaj ĉefministroj kuraĝas serioze kontraŭi Usonon el timo por si mem.

Niaj soldatoj, farmistoj, popolo suferas. Politikistoj devas memori ke Ĉinujo nutras nin.

*Roger Springer*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

**Indonezio.**

VOJAĜOJ EN INDONEZIO .



*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniuj informis AE*

El la jaro 1975 ĝis kun la jaro 2016 mi vojaĝis, plejofte kun mia edzino, dek-tri fojojn tra Indonezio, ĉirkaŭe en la insuloj Kalimanta, Sulawesi, Sumatro, Ĵavo, Maduro, Balio, kaj Lombok. En la antaŭa jarcento ni amis tiujn vojaĝojn, kiel dorsosakaj turistoj, ĉar en la tuta lando, escepte de malgranda Atjeho, la virinoj, ĉiuj virinoj sen escepto, aspektis bele liberaj sen iu ajn kapkovrilo. Nuntempe mi ne plu ŝatas vojaĝi tra Indonezio, pro la islama sklavigo ante la liberecon de la virinoj. Vi eble trovas tion nejusta, ĉar mi plu vojaĝis kun plezuro tra ekzemple Pakistano, kies virinoj traktatas sammaniere. Sed tio ĉiam antaŭe estis la kazo dum miaj vizitoj al Pakistano, do natura kutimo. Kontraŭe, Indonezion mi en la pasinteco trovis libera: ne unu virino kapkovriĝis kaj aspektis liberaj kaj belaj. La viroj ne bezonas kovri la kapon.

Dum unu el niaj traironeziaj vojaĝoj, en la senkapkovrila tempo, ni vojaĝis kun amiko Willy Sinclair, sepdekjaraĝa Esperantisto de Melburno. Por Willy la vojaĝo estis la unua el du tra Indonezio, kaj ni kondukis lin tra Balio kaj tra tuta Ĵavo. Kiam ni alvenis en la okcidenton de la insulo, post aŭtobusaj vojaĝoj el de Denpasaro, ni restis kelkajn noktojn en Tasik Malaya, sufiĉe granda, kaj tre agrabla urbo, kie ni havis nian unuan manĝon de kuirita serpento (pitono, sed Alida kaj Willy manĝis nur la duonon). Ni sciis, ke plus-minus dek kilometrojn okcidente troviĝis fama kaj turisma vulkano Galunggung, kiu kelkajn tagojn antaŭe eksplodis kaj plu eksplodas. Ni do decidis aŭtobuse vojaĝi pli proksimen al la vulkano, kaj eliris en apuda vilaĝo nedifektita, kies domoj kaj ĝardenoj estis kovritaj de kelkaj centimetroj da cindro. La cindro estis elĵetita de la vulkano ĉe la plej forta eksplodo kelkajn tagojn antaŭe. La delikata parto de la cindro plu pendadis alte en la aero kaj estis netravidebla. Dum la tago, post la granda erupcio, la vulkano plu elŝpruĉis sian cindron, sed ne tre alten kaj ne ĉirkaŭen. Dum la noktoj iom pli. Ni do promenis sur la ĉefvojo tra la vilaĝo al la grincanta monto.

Daŭrigota.

*Marcel Leereveld.*

## ADJEKTIVOJ ĈE KUNMETAĴOJ.

La fenomeno de Adjektivo ĉe kunmetita Substantivo povas krei problemon precipe kiam la flankemento de la kunmetaĵo estas verbradika. Sed ankaŭ ĉe substantivradika flankemento tiu dusenceco okazas, ekzemple en “historia verkisto”: ĉu la verkado estas pri historio? Aŭ ĉu la isto, la persono, estas historia? Analize la du ebloj tekstas “fakulo de verkado pri historio” kaj “historie konata verkisto”. Ĉar en la lasta kazo la adjektivo (historia) difinas substantivon (isto), oni ne povas fari kunmetaĵon “\*histori(verk)isto”, ĉar oni ne rajtas kunmeti adjektivon kun sia substantivo. Sed oni rajtas kunmeti adjektivon (historia) kun sia substantivo (verk) se la kunmeto ricevas ekstran ĉefelementon (-isto), same kiel “ruĝrozo” ne permesatas sed “ruĝrozbukedo permesatas. Do la solvo por distingi la du “historia verkisto” estas: uzi por “isto por la verkado pri historio” la terminon “historiverkisto”, aŭ “verkisto pri historio”, kaj por “historia(konata) isto(persono) kiu estas verkisto” la terminon “historia verkisto”. Anstataŭ cerbumi pri la komplikaĵoj, la plejmulto de la Geesperantistoj sendube preferas la tuj klarajn pli analizajn formojn “la persono kiu verkas pri historio” kaj “la verkisto kiu estas historie konata”. Jen kelkaj pluaj de tiaj dusencaĵoj: **1).** “Subakva naĝinstruisto” estas aŭ naĝinstruisto kiu hazarde estas subakva” aŭ “(speciala) instruisto por instrui subakvan naĝadon”. **2).** “Alta saltanto” estas aŭ “(piedpilkisto) iu kiu hazarde saltas alte” aŭ

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

“iu kiu profesie faras altajn saltojn”. 3). “forta kantistino” aŭ forte kantas aŭ estas forta virino. 4). “longa naĝanto” estas aŭ korpe longa aŭ naĝas longe. 5). kruele murdito” estas aŭ iu kiu kruele murdatis aŭ murdito kiu hazarde estis kruele. Solvu ilin kiel pli supre menciite. **Marcel Leereveld.**

### ŜANGĤ IDEOJN .

La utila artikoleto de Franciska pri la malrapido de ideoŝanĝoj atentigas nin ke KAJ ankaŭ ni mem malrapide ŝanĝas niajn ideojn KAJ ke ankaŭ ni spertadas ke niaj novaj ideoj malrapide akceptatas de la homaro. Ekzemple ŝi mem pli rapide ekzamenas kaj tial akceptas kelkajn el miaj gramatikaj ŝanĝoj ol la resto de la Esperantistaro faras, konserveme. Ankaŭ mi, dum la unua duono de mia vivo, malakceptis novajn ideojn de aliaj Esperantistoj kaj blinde akceptis malĝustajn akceptitaĵojn, kia ekzemple la geografia finaĵaĉon “-io”.

Ŝia propono ke la lernejoj devus instruati pli baldaŭe pri novaj sciencaj inventoj estas utila, sed bonŝance la infanoj nun, pro la pli forta informservo, ekscias tiujn novajn sciencaĵojn rapide mem, ekster la lernejoj. Ili ankaŭ estas malpli konservemaj, ĉar pli scivolemaj. Do mi ne timas pri ilia manko de ŝanĝemo. Kaj kelkfoje la novaj sciencaj ideoj devas baldaŭ ŝanĝati refoje. **Marcel Leereveld.**

### LA LEĜO .

En Aŭstralio ekzistas leĝo kiu diras, ke se oni povas helpi personon kiu bezonas helpon pro akcidento, oni devas doni tiun helpon. Se oni ne helpas, oni faras kriman agon kaj povas punati por tio. Oni ankaŭ devas malhelpi ke okazu akcidento al alia persono.

Ĉu tiuj leĝoj ne aplikiĝas al homo kiu, sciante ke li povas kaŭzi koronavirusan malsanon, tamen miksiĝas kun aliaj homoj? Registaroj konsilas, ne procesi kontraŭ tiaj ofenduloj, sed ŝajnas al mi, ke ili ne volas tion, ĉar preskaŭ ĉiuj tiaj ofenduloj estas afrikdevenaj kaj ne konas tiujn leĝojn. **Marcel Leereveld.**

### MIA ĜARDENO .

En mia ĝardeno nun riĉe floras la arbeto sambuko, “*elderberry*”, kies berojn mi manĝos en la somerfino. Laŭ tradicio, la beroj helpas oniajn pulmojn malhelpi malsaniĝi. Oni ne trovas tiujn berojn en la butikoj.


Ankaŭ floras nun, kaj belege, tri malsamaj kalistemonospecoj kun malhele ruĝaj floroj, unu larĝa kaj tre malalta, unu arbeto kaj unu arbo. La angla nomo estas *Bottle Brush*, kaj ili bezonas malmulte da akvo. Kelkaj pli helaj koloroj jam floris antaŭ unu monato, bele sed ne impresiva.

Ankaŭ nun belege floras la pluraj sovaĝaj rozoj kun la unutavolaj floroj.

**Marcel Leereveld.**

★★★  
Nur la venkintoj skribas pri la glora historio de milito.  **Roger Springer**

★★★

**3ZZZ** .En la elsendo de la 23a de novembro eblas aŭdi intervjuon de Emma Braŭniger pri ŝia vivo devige en Ruslando kaj ekscii kial en krizotempo homoj geedziĝas pli frue  **Franciska Toubale**